

Tagiĝo 8

Neregula cirkulero de

Esperanto-Junularo

en ĈRS.

Eldonas Osvětová beseda,

záj. kr. Esperanto, Opava



MAXIM GORKIJ O ESPERANTU.

Konservativní názor tvrdohlavě dokazuje, že esperanto je utopistický výmysl. Živá, zákonitě se rozvíjející skutečnost bez unáhlenosti, ale čím dále tím rozhodněji vyvrací názory konservativců.

Před 40 roky většina lidí považovala elektrickou energii za kacířský výmysl a za šílenou utopii; před 20 lety považovala za utopii vzduchoplavbu; telefon byl též jednou z utopií, které lidský rozum uskutečnili o bezdrátové telegrafii se též hovořilo jako o šílenství.

Ale dobýváje jednoho vítězství za druhým, neúnavný lidský rozum v boji s tajnými silami přírody stává se vynalézavějším a předkládá na vyřešení stále "více utopistické" a "šílené" otázky a problémy. Středověké utopie o "kameni mudrců" a elixíru života teď studují světoví učenci ve svých laboratořích. Nejlepší lidé Ruska se snaží uskutečnit "nejšílenější utopii" – zajištění sociální rovnosti na celém světě, a přece nemůžeme říci, že jejich snahy jsou neúspěšné.

Dějiny kultury nám přesvědčivě dokazují, že nejneohroženější vůdcové lidstva uskutečnili za svého života mnoho "šílených utopií" a že tyto neúmýslné vidiny se stále častěji mění na tvořivé hypotézy vědy.

Teď se sjednocuje na uskutečňování utopií mnoho tisíc, ba milionů lidí - a právě teď je jediný mezinárodní jazyk pro lidstvo potřebnější než kdykoliv předtím. Když máme na mysli správnou věc, nepracujeme zbytečně. Nevyhnutelnost mezinárodního jazyka pro mezinárodní proletariát je podmíněna jednotou třídních požadavků a cílů proletariátu.

Podle mého názoru je esperanto zdravý a dalšího vývoje schopný zárodek mezinárodního jazyka. Již teď má esperanto dost rozsáhlou literaturu a teoreticky se celkem úspěšně vyvíjí. Tato práce půjde ještě rychleji vpřed, až se na ní zúčastní učení filosofové, a to ti, kteří jsou přesvědčeni o nevyhnutelnosti sjednotit lidstvo.

Říká se: "Jazyk se uměle nerozvíjí."

Já nejsem esperantista, ale vím, že tento uměle vytvořený, rychle se vyvíjející jazyk se stává celkem přirozeným zjevem, který odpovídá potřebám dnešního lidstva: najít anebo sestavit všeobecně srozumitelný jazyk.

V roce 1910 můj známý, Alexej Semjonovič Jakutstskij, přešel, celou Evropu, neovládaje ani jeden evropský jazyk, jen esperanto. Udělal to proto, aby si osobně ověřil stupeň rozšířenosti "umělého" jazyka. Skoro v každém důležitém i méně důležitém městě Evropy našel esperantskou organizaci. Jsem pevně přesvědčen, že oiganisovaná vůle mas je celkem schopná přetvářet umělé na přirozené.

Cožpak samotná kultura není "umělým" zjevem? Dožili jsme se doby, ve které nám nekulturní člověk připadá jako nepřítel našich snah, překážkou pokroku a dalšího vzrůstu kultury.

Pro vítězství kultury děláme revoluci, nešetříme svůj rozum ani vůli, obětujeme svoji osobní svobodu, svůj život. Nebo je možno popírat, že jeden jazyk, jediný pro všechny, přispěje k rozšíření a rozvíjení kultury? Není možno!

To znamená, že musíme považovat vytvoření a rozvíjení takového jazyka za nevyhnutelné.

I o m p r i n i

Oni jam skribas la jaron 1953, sed ni revenu en pensoj al jaro ĵus pasinta. Certe interesos vin, ĉu la jaro 1952 signifis por ni malvenkon, malkreskon aŭ malon.

Necesas diri, ke tiu jaro streĉigis niajn fortojn kaj alportis kelkajn novaĵojn, kiuj influis vojon de nia movado en Ĉeĥoslovakio.

Multaj niaj ges-anoj estis vere entuziasmigitaĵoj por la afero de savaj vaj klopodoj rilate la gazetojn, la centron kaj la ceteron. Ili penis ĉiuforte, sed bedaŭrinde ne estis subtenataj de ĉiuj. Ni memorigu al ni, ke tre malmultaj s-anoj aliĝis al Asocio. Mankis pli granda kuntenemo kaj pli forta kolektiva konscio. La gazetoj ĉesis aperadi. Post monatoj likvidiĝis la Asocio. Ĉu tio estas la kaŭzo de malprospero, forlasado de Esperanto? Ne, gesamideanoj, vi ne povas tiel pensi, vi devas forlasi timon, malesperon kaj malĝustajn opiniojn! Menciitaj frapoj ne signifis malvenkon. Ili vekigis kuraĝon kaj novan energion. Nia organiza disigo elvokis unuecan forton kaj kunlaborem.

La okazintaĵoj eĉ ne signifas malkreskon, kvankam kelkaj s-anoj laŭdire rimarkas ĝin. Konsciu! Mezurilo de nia agado, de nia movad-forto, ne estas cirkuleroj kaj ceteraj presaĵoj! Ni ne estu malsaĝaj! Estas klare, ke kontraŭ decidoj de aŭtoritatoj ne eblas agi! La cirkulerojn plejparte ni ne povas eldonadi pro ĝenerale konataj kaŭzoj. La cirkulerojn ni devas anstataŭi per korespondado interkluba kaj vizitoj (vidu la proponon de s-ano Pastor!)

Tiuj pripensitaj manovroj estas pruvo de nia vivo, tiaĵoj estas mezurilo de nia stato. Esperantistaj entreprenoj, kiel estas regionaj konferencoj, diversaj vesperetoj kaj solenaj kunvenoj, estas ofte kaj sukcese aranĝataj, programo estas vere altnivela kaj ĉeesto ĝojiga. Kiam estis anoncote, ke ankaŭ ĉi-jare okazos Esperanto-Kolegioj, mi aŭdis la esprimon: "Ni estas nemortigeblaj!" Jes ni havu ĝojon el nia forto leĵ persisto, ni daŭrigu la vojon celitan!

En ĈSR ekzistas minimume 30 grupoj de Esperanto-Junularo. Precizajn informojn mi ricevis de 24 grupoj, la ceteraj ankoraŭ ne sendis "Informlison". Permesu, ke mi prezentu kelkajn numerojn:

En 24 grupoj estas organizitaj 601 gesamideanoj, el ili 275 aktive partoprenas agadon. Grava tasko de niaj grupoj estas eduko de bonaj funkciuloj kaj instruistoj de Esperanto. El supre menciita nombro havas 19 gejunuloj ekzamenon pri kapableco instrui Esperanton, kaj 26 pri scio de Esperanto. Certe estas multaj aliaj kiuj estas kapablaj instrui eĉ sen ekzameno. Mi ankoraŭ aldonos, ke 11 grupoj ekzistas ĉe ROH, 9 ĉe OB, pluaj estas ĉe Pionýr aŭ lernejo. Kiam mi ricevos novajn informojn de ceteraj grupoj, ciferoj pruvos nian kreskon ankoraŭ pli klare.

Fine mi bonvenas en nia movado nove kaj ree aliĝintajn grupojn, nome Junularojn Svitavy, Duchcov, Hodonín, Olomouc kaj Vsetín.

Al ĉiuj niaj junaj Esperantistoj mi vokas: Ĝis revido dum ĉi-jara tutŝtata konferenco do ĉeĥoslovaka Junularo!

Ĉiujn mi salutas kaj deziras plenan sukceson en plua laboro!

Jan Werner.

Konferenco en Olomouc.

Dimanĉe la 4an da januaro 1953 okazis en klubejo de hotelo Palace laborkonferenco de esperantistaj grupoj ĉe sindikataj uzinkluboj kaj klerigaj kunularoj el regionoj Olomouc kaj Ostrava. Ĉeestis 90 delegitoj el 29 lokoj (statistiko: regiono Olomouc 37 delegitoj el 11 lokoj, regiono Ostrava 27 delegitoj el 6 lokoj, regiono Brno 6 delegitoj el 3 lokoj, regiono Gottwaldov 5 delegitoj el 4 lokoj, regiono Jihlava 6 delegitoj el 1 loko, bohemiaj regionoj 8 delegitoj el 3 lokoj kaj Slovakio 1 delegito.)

La kunveno estis ekkomencita per tekstero el la parolado de D-ro L. L. Zamenhof en Guidhall la 21. 8. 1907. Post recitado de poemoj de s. Kubala el Ostrava referis vicprezidanto de iama EAĈSP s. Rudolf Hromada pri la nuna stato de Esperanto-movado en ĈSR kaj pri la pluaj perspektivoj por nia agado. Li menciis ankaŭ pri prelego de prof. Dro V. Skalička en Praha "Problemo de la helplingvo laŭ Stalin-teorio". Poste donis raporton regiona peranto s. Vladimír Slaný pri la stato de Esperanto-movado en Ostrava regiono kaj pri agado de tieaj esperantistoj en la jaro 1952. Sekvis raportoj el unuopaj grupoj en regionoj Ostrava kaj Olomouc. Raportis delegitoj el Ostrava-Junularo, Ostrava-Zábřeh, Opava, Bohumín, Třinec, Kopřivnice, Bílá Lhota, Olomouc, Prostějov, Přerov, Šternberk. Ankaŭ kelkaj delegitoj el aliaj regionoj en siaj salutparoloj menciis pri la agado de siaj grupoj.

Kun granda entuziasmo estis akceptita saluttelegramo de s. Dro Pitlík, anoncanta ke ankaŭ en la jaro 1953 okazos Somera Esperanto-kolegio en Doksy.

Por la jaro 1953 interkonsentis la esperantistoj el regionoj Ostrava kaj Olomouc pri sekvanta agadprogramo: meze de marto okazos komuna laborkonferenco en Ostrava, ĉe kiu estos malfermita Esperanto-ekspozicio, meze de majo okazos plua komuna laborkonferenco en Přerov, 21an de junio tradicia pilgrimo sur la monton Čantoria. S. Slaný promesis, ke dum julio estos denove aranĝitaj someraj Esperanto-kurso en Rožnov kaj la delegitoj de Junularo en Opava menciis pri tio, ke ili ankaŭ ĉitujare intencas aranĝi tendaron de Junularo apud Žimrovice.

Estis denove riparolita neceso de kunordigo de esperantistaj entreprenoj kaj al la delegitoj akcentigita, ke la kunordigan kalendaron por regionoj Ostrava, Olomouc kaj por Junularo gvidas s. Svačina el Lanžhot. Krom tio estis interkonsentite krei komunan laborkomitaton de esperantistaj grupoj el regionoj Ostrava kaj Olomouc, en kiun ĉiu grupo elsendos unu delegiten. Kiel prozidanto estis elektita Vladimír Slaný el Ostrava. Kunsido estis finita per la himno La Espero.

Dimanĉe posttagmeze en la domo de Regiona Muzeo en Olomouc estis inaŭgurita Esperanto-sekcio de ĉi tiu muzeo. Post salutparoloj de reprezentantoj de regiona muzeo kaj Esperantista Klubo en Olomouc donis al la ĉeestantoj necesajn klarigojn kreinto de Esperanto-kolekto en muzeo de Olomouc s. Mojmír Hanuš.

Sabate la 3an de januaro 1953 vespere okazis en la klubejo de hotelo Palace en Olomouc interkona vespero por la gekonferencanoj. Laŭ enirbiletoj ĉeestis 110 personoj, nur esporuntistoj. Programon prizorgis plejparte anoj de Junularo en Olomouc kaj Přerov.

La konferenco montris al ni, ke la esperantistoj el regionoj Ostrava kaj Olomouc daŭrigas en sia laboro kaj ke ili bone eluzas la eblecojn, kiujn donas al ili klerigaj kunularoj kaj sindikataj uzinkluboj. Plue la konferenco kreis firman fundamenton por ankoraŭ pli kunlaboro de esperantistaj grupoj en regionoj Ostrava kaj Olomouc kaj ilia reciproka interŝanĝo de spertoj de poresperanta agado. Kaj la plej grava estas, ke dum la konferenco montriĝis, ke ĉiuj niaj grupoj estas regataj por la ideo helpi per Esperanto al la konstruado de socialismo en nia lando, kiel esprimis tion la devizo de la konferenco "Por paco, por socialismo."

Dr. V. Mohapl

L u m o.

Hinda fabelo.

Antaŭ longaj tempoj vivis en Hindujo patro kaj tiu havis du filojn. Li estus tre dezirinta scii, kiu el ili estas pli saĝa. Li do faris kun ili jenan provon. Li donis al ĉiu negrandan moneron kaj diris: "Aĉetu por ĝi ion, kio plenigus tutan ĉambron."

La pli aĝa filo primeditis kaj diris al si: "Por tio plej taŭga estas pajlo. Do kio alia estus por malmulta mono tiom, ke ĝi plenu la ĉambron?" Do li aĉetis pajlon kaj enmetis ĝin en la ĉambron. Estis ja multe da pajlo, sed tamen ne tiom, ke la ĉambro estu tute plena.

Kiam estis la vico de pli juna filo, li forigis la pajlon kaj meditis pli longe ol lia frato. Poste li aĉetis kvar kandelojn kaj en ĉiun angulon de la ĉambro li starigis unu kaj ekbruligis ilin. Li vokis poste la patron kaj diris al li: "Jen, patro, mi plenigus la ĉambron per lumo, eĉ unu angulo ne estas malplena."

La patro laŭdis lin kaj diris: "Kiu pripensas, tiu fine ĉiam komprenas." Kaj li rekompencis lin pro lia sprito.

Esperantigis

Valja Flašarová.

oooooooooooooooooooo

Propono de s-ano Pastor:

"Mi opinias, ke la plej bona kontakto inter la Junularoj estas persona korespondado. Hodiaŭ jam multaj gesamideanoj de multaj kluboj kaj grupoj korespondas kun samideanoj el aliaj grupoj. (Komenco de ilia korespondado estas ekz.: renkontiĝo en Rožnov, en Doksy aŭ dum Nikolaa vespereto ktp.)

Mi opinias, ke ni povus tiun korespondadon tre bone eluzi. Krom siaj privataj skribaĵoj, ĉiu povus aldoni kelkajn frazojn pri sia Junularo, pri sistemo de ilia laboro, pri kunvena programo, kie kaj kiel ili trovis novajn samideanojn, kian ili ricevis Esperantan libron, gazeton, kian novan ludon aŭ konton ili konas ktp.....

Kun la propono ni konsentas kaj kredas, ke nia Junularo-grupoj utiligos korespondodon de siaj membroj kaj tiel plifortigos nian kunlaboron.

oooooooooooooooooooo

Opinio de Soveta Scienca Akademio pri Esperanto.

Okaze de la VI-a Proletara Esperanto-Kongreso en Leningrad en 1926:

La Sovetia Scienca Akademio esprimas sian esperon, ke la esperantista movado fortege akcelos la disvolviĝon de vastbazaj internaciaj rilatoj inter laboristoj kaj unuige la laboristajn masojn en ilia nobla celado al progreso kaj solidareco.

Georgi Dimitrov

batalinto por la libereco de la bulgara nacio, konstruinto de Bulgarujo:

Vi devas labori plu! Antaŭ ĉio eldonu broŝuron pri nova, demokrata Bulgarujo kaj pri sukcesoj atingitaj sur kampo de ĝia ekonomio. Vi estas neŭtrala organizo, viaj rilatoj kun aliaj esperantistaj organizoj estas valoraj kaj vi devas ilin bone profiti.

oooooooooooooooooooooooooooo

Milí čtenáři!!

Dostáváte dnes osmé číslo našeho ústředního oběžníku Tagiĝa. Naše redakce se však setkává s mnoha překážkami při jeho vydávání, z nichž nejdůležitější je otázka cyklostylového papíru. Malá reserva, kterou jsme měli od vydávání Junularo agu, byla rychle vyčerpána a na tento oběžník jsme sehnali potřebný počet papírů., jen s vypětím všech sil!

Představíte-li si, že náš adresář obsahuje asi 600 adres, na které Tagiĝo máme posílat a znásobíte-li toto číslo počtem listů jednotlivých čísel, dostanete číslo jistě úctyhodné, které přepočteno na cyklostilové papíry, působí nám vážné obavy. Musíme tedy potřebná množství papíru zakoupit, což není úkol příliš snadný, přece však proveditelný, horší je otázka, čím krýt cenu papíru u ostatních výloh, spojených s vydáváním oběžníku, dosud vše financovala pokladna našeho Junulara, ale ta je v poslední době na suchu!

A protože členové našeho kroužku jsou většinou studentky a studenti, kteří peníze nemají nikdy nebo málokdy - je nucena naše redakce požádat, Vás - čtenáře - o finanční příspěvek, který je též podmínkou dalšího odebírání TAGIĜO pro rok 1955. Jeho spodní hranice je 20 Kčs (slovy: dvacet Kčs) a horní je určena finančními možnostmi čtenářů.

K tomuto kroku jsme byli přinuceni okolnostmi, ale doufáme, že tato částka nezatíží nikoho citelně!

Příspěvek pošlete připojenou složenkou!

Děkujeme Vám!

Vaše redakce.

0-0-0 0-0-0

Lokaj informoj:

Brno: Junularo en Brno kunvenadas dufoje ĉiusemajne en la Sanitara lernejo. Por la klubo en Brno ni preparis kelkajn programojn: la 30an de septembro vesporon "Aŭtuna poezio", kie ni prezentis novajn tradukojn de ĉeĥa poezio, verkitaĵn de s. R, Hromada, kro Pumpr kaj J. Kořínek.

En novembro sekvis vespero, dediĉita al fragmentoj el nova traduko de la "Bapto do sankta Vladimiro" de s. T. Pumpr. Antaŭ la Kristnasko ni prezentis programon sub nomo "Kristnasko en literaturo", enhavanta ankaŭ tute novajn tradukojn, kiujn afable verkis s. Hromada, Dro Pumpr kaj J. Kořínek. Dum niaj kunvenoj ni parte lernas, preparis novan programon kaj ludas societajn ludojn.

D. Chlubnová.

Lanškroun: Ni aranĝis komence de oktobro kurson por komencantoj, kiun vizitadis 25 ges-anoj. Instruis s. Kretschmar. Adreso de nia rondeto estas: Naďa Jirečková, Lanškroun, Školní 128.

Chrudim: Proksimume 8 anoj, kiuj volus fondi rondeton, ĝis hodiaŭ sensukcese serĉas taŭgan ejon por sia laboro.

Pardubice: De oktobro ni aranĝis 5 kursojn por komencantoj kaj progresintoj. Kursojn vizitadis proksimume 20 anoj, instruis samideano Štěch kaj s-ano Franc.

K. Franc

České Budějovice: Regiona delegito por regionoj České Budějovice kaj Plzeň estas: Miloslav Vlk,
Malinovského 31, České Budějovice

Opava: 7 anoj de nia Junularo partoprenis la laborkonferencon en Olomouc. Ni starigis malgrandan kant-rondeton, kiu preparas kulturajn enmetaĵojn por niaj entreprenoj. Kurson por komencantoj gvidas s. M. Matušková. Konvarsaciajn vesperetojn partoprenas ĉirkaŭ 20 anoj. N.V.

0 - 0 - 0 - 0

Junularo en Opava kaj speciale redakcio de Tagiĝo dankas al samideano František Svačina, kiu afable sendis al ni 1 000 ciklostilpaperojn.

0 - 0 - 0 - 0

Riceveblaj esperantaĵoj.

Kiu deziras "Grandan vortaron Ĉeĥa - esperantan" de fratoj Filip, por 250 Kčs (du cent kvindek Kčs) anstataŭ 390 - Kčs, kaj Esperantan gramatikon sur poŝtkartoj por 2 Kčs, skribu al Jan Werner, Gottwaldova 65, Lanškroun.
(Prezoj estas sen afranko!)

Cirkuleron TAGIĜO eldonas: Kleriga kunularo, interesa rondeto Esperanto en Opava.